

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2025. №4



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2025. №4 (326)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2026

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 34 usonaj dolaroj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2025, №4 (326).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 2 января 2026 г.

© La Ondo de Esperanto, 2026

Bazaj informoj pri “La Ondo de Esperanto”	2
En ĉi tiu numero	3
Eventoj	5
Povilas Jegorovas. Litovio bilancas kaj planas	6
Raymonde Coquisart. Agrabla Zamenhofa posttagmezo en Parizo	9
Laurent Vignaud. Muziko, dancoj kaj Esperanto en Angers	10
Ronald Schindler. Zamenhoffesto en Berlino	11
Lu Wunsch-Rolshoven. La 16a Zamenhofa Matentagmanĝo en Berlino 2025	12
Ostoj Kristan. Zamenhof-Tago en la ĉefurbo de Slovenio	12
Gou Xinyue, Xie Ruifeng. Zamenhof-festa kunveno en Pekino	14
Bharat Kumar Ghimire. Festkunveno kaj oficiala kurso en Nepalo	15
Roman Ralko. Nova Zamenhof-Taga provo en Minsko	16
Povilas Jegorovas. Kaŭno invitas la 113an UKon	17
Espoir Ngoma Kasati. Esperanto kaj Unesko en Samarkando	18
Yves Nevelsteen. La GeBeneluksa Kongreso en Scheiden-Gemünd	20
Haesim Park. La 57a Korea Kongreso de Esperanto	22
Avotra Marie Nafifinjahary. Malagasa Seminario – pordo al nova mondo	24
Aurora Bute. Landa renkontiĝo en Rumanio	25
Ulrich Brandenburg, Gerald Roemer. Migrado kaj ... gramatiko en norda Germanio ..	27
Zsófia Kóródy. Jarfinaj semajnfinoj en la Esperanto-urbo	28
La sepa Esperanto-Forumo inter Ŝanhajo kaj Seulo	30
Amapola Triguero, Murielle Caré. Dutaga kurso de Dennis Keefe por instruantoj.	31
Katalin Kováts. Dek novaj panteonanoj	32
Everton Linhares. La unua ekspozicio en Pouzalegro	33
Rafael Zerbetto ricevis la Amikecan Premion de Ĉinio	34
Alekso Miller, laŭreato de la Premio Maertens 2026	36
Aleksander Korĵenkov. 621 aliĝintoj al la kongreso en Graco	38
UEA invitas prelegi en Graco	38
La 112a UK okazos en Melburno	39
La Esperanto-Kastelo atendas vin printempe	41
La 99a Kongreso de SAT	41
La 74a Kristana Esperanto-Kongreso	42
La 15a Internacia Himalaja Renkontiĝo	42
Koncize (9 novaĵoj)	43
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Roman Dobryński forpasis	44
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Rob Moerbeek forpasis	44
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas	45
Tribuno	46
Deklaracio de ELI pri la milito en Gaza-strio	47
Giacomo Comincini. TEJO diskutas deklaron pri Israelo kaj Hamas	47
El la deklaro de la 98a SAT-Kongreso	48

Fernando Maia Jr. AKIRI – La Strategia Plano de UEA por 2025-2030.....	49
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Homaj Rajtoj, la 10a de decembro 2025.....	50
Solidareco milittempe.....	51
Lingvo.....	52
François Lo Jacomo. Konferenco de la Akademio 2025	53
Laŭro de la Akademio	54
Kirilo Brosch. Lingva Konsultejo: Sintezaj kunmetitaj verboformoj	55
Arkivo	56
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2026	57
Anatolo Sidorov. Historia ĉefverko de la kuranta jaro	59
Kulturo	63
Aleksander Korĵenkov. Rusa Novelaro. Volumo 2	64
Valentin Rasputin. La renkontiĝo. Rudolfo. La onidiro. Onklino Ulita (Tradukis el la rusa Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Ludmila Novikova)	65
Paulo Sérgio Viana. Kristnaska rakonto.....	99
Miguel Fernández. Literatura sekvo de la 83a kongreso de HEF	101
Juan Bozal Alfaro. Biografia noto pri Manuel García Sesma (Tradukis el la hispana Miguel Fernández)	103
Manuel García Sesma. La Verda Stelo (Tradukis el la hispana Miguel Fernández) ...	104
Ludmila Novikova. “Briladu mia stel’ sen falo...”.	111
Wolfgang Kirschstein. Homoj devas esti kontentaj pri komoj	123
László Krasznahorkai. Herscht 07769 (Tradukis el la hungara István Ertl).	125
Wolfgang Kirschstein. Obsedata farango (Recenzo: Sten Johansson. Farango)	127
Wolfgang Kirschstein. Ŝirmejo aŭ groto (Recenzo: Paulo Sérgio Viana. La ŝirmejo) ..	129
Floréal Martorell. Nova ĝardeno en nova platformo!.....	131
Floréal Martorell. La amo protektas nin: Debuta albumo de Kris Fredi	132
Floréal Martorell. La MondAnoj: Nova bita albumeto aperis.....	133
Aleksander Korĵenkov. Unesko-Kuriero pri manĝaĵoj	134
Halina Gorecka. Beletro Almanako, 2025, №52-53	135
Literatura Foiro. 2025, №338.....	136
Miguel Gutiérrez Adúriz. La 77aj Belartaj Konkursoj de UEA.....	138
“Unu Mondo en Bildoj”: Fotokonkurso 2026 de ILEF	140
Literatura konkurso “Ĥristo Gorov – Ĥrima 2026”	141
Mozaiko	142
Stanislav Belov. Br! Brr!	143
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	144
Perantoj de “La Ondo de Esperanto”	145

Kovropaĝe: La antaŭlastan tagon de la 2025a jaro finfine ekneĝis en Kaliningrado, kaj ni ĝuis etan novjarfestan promenadon sur neĝo, kiu tamen ne estas tiel abunda kiel sur la kovropaĝa pentraĵo “Kabano en vintra arbaro” (1888) de Aleksej Savrasov.

Eventoj



“Post Burno – Melburno”.

“Post Aŭstrio – Aŭstralio”.

Similaj ŝercetoj inundis la retforumojn esperantistajn post la anonco de UEA pri tio, ke la 112a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Melburno je nekutime frua periodo de la 3a ĝis la 10a de julio 2027. Vidu p. 39-40.



Povilas Jegorovas raportas (Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

Litovio bilancas kaj planas

Dum pli ol tridek jaroj en Litovio meze de decembro okazas vica kongreso de Litova Esperanto-Asocio (LEA) kaj la tradiciaj Zamenhof-Tagoj. Ĉi-jare la 13an de decembro okazis la 60a jubilea Kongreso de LEA kaj Zamenhof-Tagoj 2025. Ambaŭ aranĝojn partoprenis 80 esperantistoj el dek urboj de Litovio, tri gastoj el Latvio kaj unu el Hispanio.

La kongreson per enkondukaj vortoj komencis la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas. Sekvis minuto da silento – ĉi-jare forpasis tri litovaj esperantistoj – Algimantas Sudeikis el Anykščiai, Aušrinė Aleknavičiūtė el Kaŭno kaj Angelė Straleckienė el Marijampolė.

La raporton pri la esperantista agado en Litovio dum 2025 prezentis Povilas Jegorovas. Li emfazis, ke la jaro por litovaj esperantistoj estis ege favora, enhavriĉa, intensa; estis kelkaj gravaj atingoj. La agado evoluis laŭ kelkaj ĉefaj direktoj.

La ĉefa afero estis organizo kaj efektivigo de la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-59), kiuj okazis en Kaŭno de la 5a ĝis la 13a de julio. BET-59 sendiskute estis la plej grava esperantista aranĝo en Litovio en la 21a jarcento post la 90a Universala Kongreso de Esperanto en Vilno en 2005. Ĉi-foje ĝin organizis ne nur LEA, sed kunorganizantoj estis ankaŭ la universitato Vytautas la Granda kaj Monda Centro

de Litovoj. La Alta Protektanto de BET-59 estis tiutempe la unua vicprezidanto de Litovia parlamento Juozas Olekas, kiu nun jam estas ĝia prezidanto. Li partoprenis la inaŭguron de BET-59.

Salutleterojn sendis tri ministroj de Litovio (pri edukado, scienco kaj sporto, pri kulturo, pri eksterlandaj aferoj). La rektoro de la universitato aranĝis luksan akcepton por BETanoj post la inaŭguro. BET-59 ricevis esencan helpon de la urbo Kaŭno, inkluzive de la financa helpo.

Al BET-59 aliĝis 296 esperantistoj el 32 landoj – reale partoprenis ĉirkaŭ 250. Ĉio okazis en la universitato Vytautas la Granda. La programo estis riĉa kaj intensa. Estis faritaj 35 prelegoj kaj raportoj, estis kvin grupoj de diversnivela Esperanto-kursoj kun instruistoj el kvar landoj. Estis tre riĉa kultura programo – okazis naŭ koncertoj de artistoj el Italio, Francio, Svedio, Pollando, Litovio. Estis montritaj kvar spektakloj de aktoroj el Italio, Francio kaj Litovio. Estis montritaj kvar dokumentaj filmoj. Severija Marija Banaitytė gvidis kurson de la litova lingvo. Aida Čižikaitė faris prelegserion pri la litovaj kulturo, historio, lingvo. Estis multaj ekskursoj.

Ĉiu partoprenanto ricevis la ampleksan kaj enhavoriĉan 154-paĝan “Libron por BET-ano”, eldonaĵon pri la pentristo kaj komponisto M. K. Čiurlionis okaze de la 150-jariĝo de lia naskiĝo, kaj faldfoliojn pri Kaŭno en Esperanto eldonitan de la Kaŭna turisma kaj informa centro. Pawel Fisher-Kotowski tre profesie redaktis la ĉiutagan gazeton “Kunfluo” – aperis 8 numeroj kun 32 paĝoj, publikigitaj 60 fotoj.

Multaj litovlingvaj komunikiloj aperigis ampleksajn artikolojn pri la 59a BET. Ankaŭ eksterlanda Esperanto-gazetaro tre pozitive priskribis ĝin (en Germanio, Nederlando, Finnlando, Israelo, Ruslando, UEA). Laŭ peto de UEA en Litovio estis presita la libro “Internacia Kongresa Universitato. Scienca Universitata Sesio” kun prelegoj de UK en Brno kaj BET en Kaŭno.

Alia grava evento de la jaro estis la 23a Internacia Medicina Esperantista Kongreso, okazinta en Kaŭno antaŭ BET-59. Litoviaj kaj Pollandaj gejunuloj okazigis komunan renkontiĝon en Druskininkai.

La Monda Centro de Litovoj kunlabore kun LEA eldonis du gravajn librojn. Temas pri la litovlingva libro “Lietuvos esperantininkai” (Litovaj esperantistoj) de leva Švarcaitė kaj la poemaro “Mi lernas ĝoji” de Inita Tamošiūnienė. En Šiauliai aperis libro de prof. Vytautas Gudonis pri Vasilij Jeroŝenko en la ukraina kaj rusa lingvoj.

Tre grava agaddirekto estas la invito de la 113a Universala Kongreso de Esperanto al Kaŭno somere 2028. Oficiala propono estis sendita al Estraro de UEA en aŭgusto. Legu pli pri la klopodoj okazigi UK-113 en la artikolo sur la 17a paĝo.

Dum la tuta jaro daŭris kutima informa laboro pri Esperanto kaj esperantista agado por ekstera publiko. LEA havas tre bonajn kunlaborajn kontaktojn kun pli ol dek amaskomunikiloj, kiuj informas pri nia agado okaze de ĉiuj niaj agadoj kaj iniciatoj (BET, IMEK, libroj k. a.).

Daŭras instruado de Esperanto en la universitatoj de Kaŭno, Vilno, Šiauliai, Panevėžys.

Funkcias sufiĉe intensaj internaciaj ligoj de litovaj esperantistoj. La 110an UKon en Brno partoprenis 18 esperantistoj el Litovio. La 6an Virtualan Kongreson de Esperanto partoprenis ses litoviaj esperantistoj. Krome, Litoviaj esperantistoj partoprenis diversajn esperantistajn aranĝojn en Nederlando, Italio, Ĉinio, Koreio, Francio, Madagaskaro, Pollando, Indonezio.

Originalaj beletraĵoj de Laimundas Abromas aperis en “Penseo”, “Beletra Ede-no”, “Literatura vivo” kaj en la retejo Verkoj.com. Litovaj esperantistoj partoprenas en diversaj literaturaj konkursoj. La internacia revuo “La Ondo de Esperanto” kaj la samtitola novaĵretejo ofte publikigas materialon pri la agado de Litoviaj esperantistoj. Aida Ĉižikaitė estas akceptita en la Panteonon de Edukado.net.

En Litovio perfekte funkcias interna informado de esperantistoj. Konstante funkcias tri informkanaloj. Ekde 1996 funkcias la retejo de LEA ĉe <http://www.esperanto.lt/>, ekde 2000 funkcias la grupo de Litoviaj esperantistoj, nun ĉe <https://groups.google.com/g/esperanto-en-litovio>, ekde 2014 funkcias Facebook-grupo ĉe <https://www.facebook.com/groups/542415445773607>.

Post la raporto nome de LEA estis gratulitaj ĉi-jaraj jubileuloj. Laŭ komisiono de la Litovia ministerio pri edukado, scienco kaj sporto, la prezidanto de LEA pro meritoj en organizado de la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj kaj pro alia multjara aktivado enmanigis dankfoliojn de la ministerio al: Asta Nastaravičiūtė, Aida Ĉižikaitė, Dalia



Foto: Gražvydas Jurgelevičius

Pileckienė, Gražina Opulskienė, Gražvydas Jurgelevičius, Ramūnas Narbutas, Vida Kulikauskienė, Severija Marija Banaitytė, Solveiga Sadauskaitė.

Sekvis la komuna fotado kaj fermo de la kongreso.

Post la tagmanĝa paŭzo estis malfemitaj la Zamenhof-Tagoj, dediĉitaj al la 166a datreveno de la naskiĝo de Ludoviko Zamenhof. Unue Vytautas Šilas prelegis pri “Reviviĝo de litova Esperanto-movado. La startaj jaroj 1956-1957”. Sekvis impresoj de Severija Marija Banaitytė kaj Aušrinė Tamošiūnaitė pri la 81a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Indonezio. Estis prezentitaj noveldonitaj libroj – tiu de leva Švarcaitė “Lietuvos esperantininkai” kaj la poemaro “Mi lernas ĝoji” de Inita Tamošiūnienė. Gražina Opulskienė rakontis pri la 91a Itala Esperanto-Kongreso.

La tago finiĝis per tre ĉarma koncerto de leva Laučkaitė (violono) kaj Ugnė Barysaitė (piano). Ili ludis diversajn tango-melodiojn. Granda grupo da partoprenantoj daŭrigis la vesperon en la restoracio “Miesto sodas”.

La 14an de decembro okazis ekskurso al la historia prezidentejo de Litovio en Kaŭno. Funkciis riĉa libroservo. Ĉiuj disveturis hejmen kun entuziasmo sekvontjare daŭrigi nian gravan agadon.

Povilas Jegorovas

prezidanto de Litova Esperanto-Asocio

Agrabla Zamenhofa posttagmezo en Parizo

La 13an de decembro okazis en Parizo la tradicia Zamenhof-Festo kunorganizita de tri asocioj: Paris Esperanto Ile de France (Francilia regiono), SAT-Amikaro kaj Fervojista Franca Asocio en la salono de francaj fervojistoj apud la stacidomo Lyon en Parizo.

Dum la unua parto, dancistinoj el fervojista grupo de la stacidomo Montparnasse prezentis havajajn dancojn. Poste Elisabeth Barbay kun gitaro kantis du kanzonojn, sekvis prezento de filmetoj antaŭ ludo kun la publiko... Raymonde Coquisart disdonis al spektantoj duonon de proverboj... Ŝi laŭtlegis la unuan parton de la proverbo, kaj tiu kiu havis la duan parton legis ĝin... Ekzemple “Kie fumo leviĝas... tie fajro troviĝas”... Evidentiĝas, ke ne nur tiu, kiu havis la paperon sciis la respondon, kaj pluraj citis ankaŭ la duan parton... Kaj tiu ludo kvinfoje ripetigis... Estis ankaŭ tradukoj franclingvaj por la akompanantoj neesperantistaj el la danca grupo. (La proverboj estis el la libro “L’Esperanto par ses proverbes” de Jean Luc Tortel).

Dum la paŭzo okazis bufedo kaj lotumado, ĉiu koverta gajnis ion.

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Nova Zamenhof-Taga provo en Minsko

Kvankam Belarusio havas multajn historiajn ligojn kun Esperanto, ja Zamenhof dum kelkaj jaroj loĝis en Grodno, nun ĝi restas preskaŭ la sola lando en Eŭropo, kie ne ekzistas organizita Esperanta movado.

Lokaj Esperantistoj kaj iliaj Moskvaj amikoj decidis ŝanĝi tion. Pasintjare okaze de la Zamenhof-Tago grupo da junaj moskvanoj kaj kelkaj esperantistoj el Grodno okazigis Esperantajn renkontiĝojn en Minsko kaj Grodno por revivigi la movadon en Belarusio. Kvankam tiam pluraj gejunuloj esprimis sian deziron aliĝi al BelEJO (Belarusia Junulara Esperantista Organizo), ĉi tiu organizo ne ekfunkciis.

En majo 2025 estis organizita Esperanta ekspedicio tra Belarusio kun la celo trovi lokajn esperantistojn kaj krei jutubajn filmetojn pri kelkaj urboj de la lando, la filmetoj nun estas en la jutuba kanalo “Esperanto Vivo” <https://mallonge.net/evivo>.

Poste liceanoj de la Belarusia Ŝtata Universitato, kiuj ĉeestis la pasintjaran renkontiĝon, decidis organizi novan kunvenon okaze de ĉi-jara Zamenhof-Tago. Moskvaj esperantistoj ofertis por ili librojn en Esperanto kaj lernolibrojn. Ĉi-jare okaze de la Zamenhof-Tago en Minsko okazis renkontiĝo de esperantistoj en la antikafejo “Atmosfera” kun partopreno de ĉirkaŭ dudek gejunuloj, kelkaj el ili jam estis kapablaj paroli Esperanton kaj surprize malkovris ke ili ne estas la solaj esperantistoj en Minsko.

Dum la renkontiĝo mi prelegis pri la vivo de Zamenhof kaj pri la historio de Esperanto, pri famaj Belarusiaj esperantistoj kaj pri la perspektivoj de revivigo de la landa movado; estis venditaj lernolibroj. Unu el la junaj liceanoj anoncis sian propran Esperanto-kurson por liceanoj sekvontjare.

Roman Ralko

Kaŭno invitas la 113an UKon

La 10an de aŭgusto 2025 Litova Esperanto-Asocio (LEA) prezentis proponon al la Estraro de UEA en 2028 organizi la 113an Universalan Kongreson de Esperanto en Kaŭno. Intertempe la komencaj preparoj al tiu eventuala kongreso jam estas faritaj. Ni kontaktis la universitaton Vytautas la Granda, kie okazos plejparto de programeroj, turismajn organizaĵojn, parlamenton de Litovio. Komenciĝis ankaŭ diskutoj kun la urba municipo pri diversaj aspektoj de la organizado de UK, inkluzive de la financa helpo de la urbo. Sube estas informoj pri kelkaj gravaj renkontiĝoj kaj vizitoj al diversaj instancoj lige kun la eventuala UK en Kaŭno.

La 1an de decembro laŭ la iniciato de la Kaŭna turisma kaj informa centro “Kaunas IN” okazis kunsido rilate al la eventuala 113a UK en Kaŭno en 2028. Partoprenis la direktoro de “Kaunas IN” Tadas Stankevičius kaj la fakestrino pri turismo Agnė Kriauciūnienė. Estis invitita ankaŭ reprezentanto de la turisma firmao “Delta Tours” Lijana Stepanovienė. Ĉi tiu firmao helpis al ni okazigi la 90an UKon en 2005 en Vilno (ekskursoj, hoteloj k. s.). La propono organizi UKon en Kaŭno en 2028 estis akceptita tre entuziasme kaj estis promesita ĉiuspeca helpo. “Kaunas IN” sendos al la Kongresa fako de UEA specialan subtenleteron kun prezento de la urbo kaj lando. Similan subtenleteron sendos ankaŭ la tutlanda publika entrepreno “Keliauk Lietuvoje” (Vojaĝu en Litovio), kiu rekte subiĝas al la Ministerio pri ekonomio kaj novigoj.

Danke al kontrakto pri kunlaboro inter Litova Esperanto-Asocio kaj la universitato Vytautas la Granda en Kaŭno nia asocio kaj la universitato estas partneroj. Tio ebligas al nia asocio havi esencan helpon de la universitato por nia agado. La prezidanto de LEA kontaktis la novan rektorinon de la universitato prof. Ineta Dabašinskienė (interalie, ŝi estas lingvistino kaj okupiĝas ĉefe pri multlingvismo) pri la eventuala UK en la universitato. Ŝi plene aprobis la aferon kaj komisiis al la vicrektoro pri scienco kaj novigoj prof. Rolandas Urbonas respondeci pri la afero, konstante zorgi kaj solvi ĉiujn praktikajn demandojn dum la organizado de UK. La 9an de decembro la prezidanto de LEA renkontiĝis kun prof. Rolandas Urbonas kaj pli konkrete



Du prezidantoj: Povilas Jegorovas kaj Juozas Olekas

traktis la organizajn aferojn. Estas interkonsentite, ke UK povos uzi ĉiujn bezonatajn ejojn kaj servojn de la universitato en la kvar apudaj domoj de la universitato en la centro de la urbo.

La 12an de decembro la prezidanto de la parlamento de Litovio (Sejmo) Juozas Olekas akceptis la prezidanton de LEA Povilas Jegorovas. Estis diskutitaj preparlaboroj por eventuala okazigo de la 113a Universala Kongreso de Esperanto en Kaŭno. La prezidanto de la parlamento konsentis esti Alta Protektanto de la kongreso, se la Estraro de Universala Esperanto-Asocio decidus organizi la kongreson en Kaŭno. Estis certigita politika kaj financa subteno al la okazonta kongreso. Li partoprenos la inaŭguron de la kongreso. La prezidanto de la Litovia parlamento akceptos la prezidanton de UEA Fernando Maia dum lia eventuala vojaĝo al Litovio fine de julio 2026.

Povilas Jegorovas

Esperanto kaj Unesko en Samarkando

De la 30a de oktobro ĝis la 13a de novembro 2025 en Samarkando, grava historia urbo de Uzbekio laŭ silka vojo, renkontiĝis pli ol 4500 personoj, inkluzive de diplomatoj de membro-ŝtatoj de Unesko kaj reprezentantoj de neregistaraj organizoj, kadre de la 43a Ĝenerala Konferenco de Unesko. UEA estis reprezentita de internacia delegacio, kiun konsistigis Mireille Grosjean (Svislando), François lo Jacomo (Francio), Ningna Wei (Ĉinio), Nathalie Kesler (Francio), Espoir Ngoma Kasati (DR. Kongo), Max Garcia (Hispanio), Shah-Ahmad Mutalov (Uzbekio).

Dum la konferenco ni disdonis informilojn per kiuj ni reklamas la 26an de julio kiel Mondan Tagon de Esperanto; kontaktiĝis kun diplomatoj kaj reprezentantoj de aliaj NROj kun la celo informi ilin pri la graveco de Esperanto kaj peti ilian subtenon favore al Esperanto.

Dum la debato pri ĝenerala politiko Mireille Grosjean prelegis nome de la delegacio de UEA. En sia prelego ŝi alvokis la membro-ŝtatojn de Unesko konsideri la gravecon de Esperanto por internacia interkomunikado kaj interkulturaj interŝanĝoj inter la popoloj de la tuta mondo. Ŝi menciis du rezoluciojn, per kiuj Unesko agnoskis la valoron de Esperanto en 1954 kaj 1985. Krome, Mireille diris, ke same kiel la svahila lingvo transiras limojn de orienta Afriko, Esperanto transiras limojn tutmonde. Tiu ĉi frazo ĝustasence ne komparas la du lingvojn, sed montras la skalon de kunligado laŭ ĉies uzado el interkomunikada kaj interkultura vidpunktoj. Per tiu prelego ni faris du rekomendojn por Unesko, nome, rekoni la 26an de julio kiel Mondan Tagon de Esperanto kaj enskribi Esperanton sur la liston de nemateriaj heredaĵoj; krom mencio de du prioritatoj: Afriko kaj Virinoj.

Nia delegacio estis tre scivolem-veka pro ĝia konsisto. Pluraj diplomatoj ĉefe tiuj, kiuj ne sciis pri Esperanto, volonte interparolis kun ni. Ni estis invitataj de lokaj



uzbekaj aŭtoritatoj por komuna manĝo en restoracio, kie troveblas la bongustega tradicia plado pilafo. Same nin invitis profesorino pri la angla filologio en universitato pri fremdaj lingvoj. Tie Mireille Grosjean prelegis pri Esperanto antaŭ gestudentoj.

Ni renkontiĝis ankaŭ kun Anatolij Ionesov, samarkanda esperantisto kaj verkisto. Ĉe li ni gastis ankaŭ kun Adrian Tanner, esperantisto kaj profesia interpretisto dungita de Unesko por interpreti el la rusa kaj la angla al la franca kaj inverse. Ni spektis filmon pri diversaj agadoj de Anatolij Ionesov por Esperanto en Samarkando kaj Uzbekio, kaj ricevis donacojn de li. Tre simpatia viro, babilema kaj gastama, li donacis ankaŭ libron, kiun li kaj lia frato kunverkis pri la historio de la Esperanto-movado en Centra Azio.

Finiĝis la Konferenco, ni revenis hejmen ĉiuj. Restas nia tasko nun plurilati kun tiuj diplomatoj, antaŭenigi niajn klopodojn al plena sukceso de la du celoj kunlabore kun la membro-ŝtatoj de Unesko.

Espoir Ngoma Kasati



Samarkando: Kelkaj UEA-delegaciaĵoj kaj Anatolij Ionesov (dekstre)

La GeBeneluksa Kongreso en Schleiden-Gemünd

La Germana kaj Beneluksa Kongreso 2025 – aŭ GeBeneluksa Kongreso – okazis de la 2a ĝis la 5a de oktobro 2025 en Schleiden-Gemünd, meze de la Nacia Parko Eifel en Germanio. La aranĝon komune organizis la Germana Esperanto-Asocio (GEA) kaj la Valona Esperanto-Asocio (V.Esp.o).

La junulargastejo Gemünd, ĉirkaŭita de verdaj montetoj kaj arbaroj, bonvenigis ĉirkaŭ 150 partoprenantojn ne nur el Germanio kaj Beneluksa, sed ankaŭ el pluraj aliaj landoj. La kongreso ofertis riĉan, plurfacetan programon, plenan je prelegoj, atelieroj, kulturaj vesperoj kaj ekskursoj – ĉio en tre afabla kaj kunlaborema etoso.

Ĉi-jare la organizantoj decidis ne disdoni tradician kongresan sakon. Anstataŭe, en la Dua Bulteno ili invitis la partoprenantojn kunporti sakojn de antaŭaj kongresoj por interŝanĝi ilin dum la interkona vespero, kune kun rakontoj pri antaŭaj renkontiĝoj en Esperantujo. Ĉiu tamen ricevis bele desegnititan, plenkolora presitan kongreslibron, kiun oni povas elŝuti de la kongresa retejo <http://benelukso.eu/gebk2025>.

Programo: vere diversa kaj viva

La provizora programo aperis en la kongreslibro, sed la surloka versio estis ankoraŭ pli riĉa kaj foje aktualigata – la lasta versio ĉiam estis afiŝita sur la pordo de la akceptejo.

Inter la plej ŝatataj eroj estis:

- lingvaj kursoj sub la gvido de Katalin Kováts kaj Sylvain Lelarge
 - paroligaj rondoj kun Kristin Tytgat
 - kantateliero de Zdravka Boytcheva
 - dokumentaj filmoj de Aleksej Salomatov
 - koncertoj de JoMo kaj de la juna bando “Mezbakita”
 - diversaj prelegoj pri Neŭtrala Moresnet, “La instruo de persekutoj: la aktualeco de Esperanto”, tradukado, pri partneraj urboj, kaj pri la inundoj en la regiono Eifel
- Specialan atenton meritis la ekspozicio pri milita propagando, prezentita de prof. Anne Morelli (ULB, Belgio). Ŝi prelegis pri ĝi en la franca, dum István Ertl kaj Sylvain Lelarge profesie tradukis. Kunordiganto Eric Nemes eĉ mendis aŭskultilojn, por ke ĉiu povu bone aŭdi la tradukojn – signo de zorga preparado.

Krom la kultura programo, okazis ankaŭ ĝeneralaj asembleoj de pluraj asocioj. Bedaŭrinde, la retkonekto funkciis tre malbone, pro kio la hibridaj kunvenoj ne okazis.

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



La 8an de oktobro la prezidanto de UEA kun granda plezuro anoncis, ke pretiĝis la strategia plano de UEA por la jaroj 2025-2030 sub la nomo AKIRI. La 22-paĝa dokumento estas elŝutebla en la retejo de UEA ĉe <https://mallonge.net/ueaplan>. La strategian planon garnas pluraj ilustraĵetaĵ, kiel la supra.

Deklaracio de ELI pri la milito en Gaza-strio

Sekve de la lastatempaj evoluoj ĉe la milito en Gaza-strio, Esperanto-Ligo en Israelo (ELI) decidis publikigi sian starpunkton, kiu reflektas la opinion de multaj ĝiaj membroj.

ELI ne reprezentas la israelan registaron kaj forte pledas por paco kaj ĉesigo de la homaj suferoj ambaŭflanke. Oni tamen ne forgesu, ke tiun ĉi militon kaŭzis la terorisma surpriz-atako de Ĥamas, kiu la 7-an de oktobro 2023 kruelege murdis en unu tago pli ol 1000 israelajn kaj alinaciajn civilulojn, pli da judoj ol iam ajn post la Holokaŭsto, plejparte familiojn en siaj hejmoj kaj gejunulojn en muzika festivalo. Aldone estis kidnapitaj 250 vivantaj kaj murditaj personoj.

Kiel landa Esperanto-asocio, la celoj de ELI unuavice estas la progresigo de Esperanto en Israelo kaj en la Mezoriento, klopodante esti politike neŭtrala. Tamen, ELI ne povas resti indiferenta al la lastatempaj okazaĵoj en Gaza-strio, nek al la kondamnoj en la Esperanto-movado, kontraŭ Israelo kaj foje eĉ persone kontraŭ israelaj esperantistoj. Tiuj atakoj minacas la progreson de Esperanto en Israelo kaj damaĝas la statuson de ELI kiel registrita societo. Aliflanke, ni dankas por la multaj esprimoj de subteno kaj zorgo pri Israelo, kiujn ni ricevis de esperantistoj el la tuta mondo.

Hodiaŭ, precize du jarojn post la atako de Ĥamas, kiu kaŭzis neimageblajn suferojn al israelaj civitanoj, samkiel al la palestinaj loĝantoj en Gaza-strio, oni ekvidas la efektivigon de la lastatempe proponita kontrakto pri fino de la milito kaj liberigo de la israelaj kidnapitoj. Ni esperu, ke baldaŭ finiĝos la suferoj de centmiloj da civiluloj kiuj estis forpelitaj el siaj hejmoj ambaŭflanke de la limo, kaj ke Gazaanoj, samkiel israelanoj, povos vivi sen minaco de atakoj, terorismaj aŭ armeaj.

ELI esperas, ke tiu kontrakto, kiu jam nun estas vaste subtenata de multaj ŝtatoj en la Mezoriento kaj tutmonde, realiĝos. Ĝi ebligos al Israelo, kunlabore kun la mezorientaj landoj kaj la cetera mondo, trovi solvojn por rekonstrui Gaza-strion kiel prosperan senarmilan regionon pace regatan de siaj loĝantoj, kaj malfermos la vojon por stabileco kaj paco en la Mezoriento.

Esperanto-Ligo en Israelo

7-a de oktobro 2025

TEJO diskutas deklaron pri Israelo kaj Hamas

[HeKo] En TEJO daŭras diskuto pri deklaro kondamnanta la agojn de la israela registaro kaj de la islamisma organizaĵo Hamas, baldaŭ submetota al voĉdono en la Komitato. La interna procedo antaŭvidas minimumajn tempolimojn de naŭ tagoj por la debata fazo kaj sep tagoj por la voĉdona fazo; ĝis nun la Komitato ankoraŭ ne intervenis por fermi la debaton, fakte jam silentan de kelkaj tagoj.

La propono estis prezentita de ses landaj sekcioj kaj estas subskribita ankaŭ de la TEJO-Estraro, krome dek tri individuaj proponintoj. Inter ili troviĝas Civita senatano (c-ano Alessio Giordano), kio donas al la iniciato apartan signifon, konsiderante ke baldaŭ la Senato de la Esperanta Civito devos esprimi sin pri la rezolucio Kagina-Bartek.

La teksto de la deklaro emfazas la distingon inter politika neŭtraleco kaj morala indiferento, argumentante ke neŭtraleco ne povas servi kiel preteksto por silento fronte al gravaj malrespektoj de homaj rajtoj. En la dispozicia parto, la propono enhavas tri ĉefajn punktojn: oficiala kondamno pri la agoj de la israela registaro kaj solidareco al la palestina popolo; solidareco al israelaj civiluloj viktimitaj de diskriminacio kaj de la terorismaj atakoj de Hamas; kaj kondamno pri la malrespekto al internacia juro, kun kritiko al registaroj restantaj inertaj aŭ indiferentaj.

La voĉdono en la Komitato estas atendata post la fino de la procedaj tempolimoj, krom se interveno okazos dum la daŭranta debato.

Giacomo Comincini

El la deklario de la 98a SAT-Kongreso

La 98-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kunveninta en Greziljono inter la 9-a kaj la 16-a de aŭgusto 2025:

<...>

- pledas por la retiriĝo de ĉiuj imperiismaj kaj ekspansiismaj landoj el teritorioj, kiujn ili senrajte okupacias, sekvota de adekvataj reparacioj – de Gazao ĝis Ukrainio, okupacio estas krimo!
- kondamnas imperiismon sen rezervoj motivitaj de kliniĝo al tiu aŭ alia mond-politika tendaro;
- pledas por sistemo de interŝtataj rilatoj baziĝanta sur la internacia juro kaj kiel eble plej reprezentaj mondnivelaj institucioj;
- konstatas kun indigno la genocidan karakteron de la israela milito kontraŭ Gazao;
- postulas tujajn militĉesojn en Ukrainio, Palestino, Jemeno, Sudano, Sirio, Kongolando, k.a.;

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Lingvo



Kadre de la tradiciiĝinta Zamenhof-festa konferenco de la Akademio de Esperanto, Edmund Grimley Evans proklamis la ĉi-jaran laŭron de la Akademio: “Ek sor!” de Evgenij Georgiev, 38-jara inĝeniero kaj tradukisto loĝanta en Kazahio. Ĉi tiu poemaro konsistas el 105 sonetoj (7 sonet-kronoj) en klasika stilo. Vd. p. 54.

Konferenco de la Akademio 2025



proklamis la Laŭron de la Akademio 2025.

Prelegis kvin akademianoj, ĉeestis pli ol kvardek spektantoj.

Amri Wandel prezentis la tradukadon de dika libro pri astrobiologio, *Vivo en la Kosmo*, kiun post kvarjara verkado kune kun biologo li publikigis anglalingve (“Life in space”) ĉi-septembre. Post multjara redaktado de la IKU-libro kaj verkado de pluraj libroj (“La Kosmo kaj ni”, ...) pri astronomio kaj astrofiziko, li frontas novajn terminologiajn problemojn (vivo-zono...) en tradukado de tiu kompleta lernolibro pri nova fako. Sekvis demandoj ekzemple pri la diferenco inter biologia-signo kaj viv-signo.

Bertilo Wennergren montris al ni la testo-version de la venonta PIV. Ekde 2020, li gvidas la teamon, kiu profunde revizias tiun Plenan Ilustritan Vortaron per reta sistemo, kiun li evoluigas. La testo-versio testo.vortaro.net, ekde nun alirebla de la publiko, prezentiĝas pli klare, kun ligiloj al la precizaj kuntekstoj de la ekzemploj el pli ol 600 fontoj, kaj ĝi rajtigas ĉiujn raporti pri restantaj problemoj. Ruth Keves-Cohen, membro de la teamo, prirespondis plurajn demandojn interalie pri la dato de la presota versio, eble 2030.

François Lo Jacomo priskribis la voĉdon-sistemon de la Akademio. Estas matematike pruvite, ke ne povas ekzisti plej bona voĉdonsistemo, kaj pluraj malsamaj voĉdonsistemoj estas efektive uzataj tra la mondo. En la Akademio gravas la du-triona plimulto kaj kiel kvorumo kaj kiel rezulto, interalie por oficialaj aldonoj al la universala vortaro. Kaj por voĉdoni inter pluraj ebloj la Akademio uzas la metodon de Kondorceto: voĉdonon per prefer-ordo de ĉiuj ebloj.

Jesper Jacobsen prelegis pri la premio Ampère de la franca Akademio pri sciencoj, kiun li ricevis la 28an de oktobro 2025. En Francio ekzistas kvin akademioj fonditaj de Colbert en 1666, kiuj interalie aljuĝas premiojn. Jesper Jacobsen pristudas statistikan fizikon, geometriajn modelojn de magnetaj materialoj. Studante fraktalan promenadon en ebena hazarde tegita de etaj sesanguloj, li determinis la konstantojn de la statistika modelo. Kiam la ebena iĝas duone tegita, subite la dudimensia perkolo laŭ tiuj sesanguloj pleniĝas.

Edmund Grimley Evans, memoriginte la historion kaj la regularon de la premioj aljuĝitaj de la Akademio de Esperanto, proklamis la ĉi-jaran laŭron de la Akademio: el 16 kandidataj libroj, la sephoma juĝkomisio premiis poezian verkon aperintan

en 2024: “Ek sor!” de Evgenij Georgiev. Ĝi konsistas el 105 sonetoj (7 sonet-kronoj) en klasika stilo. 38-jara inĝeniero kaj tradukisto loĝanta en Kazaĥio, Evgenij Georgiev estis jam plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA.

En la retejo de la Akademio <https://www.akademio-de-esperanto.org/> eblas spekti ĉiujn prelegojn de la Konferenco de la Akademio kaj legi pli detalan priskribon de la laŭro de la Akademio kaj de ties aŭtoro.

François Lo Jacomo


Laŭro de la Akademio 2025

En 2025 la juĝkomisiono (Edmund Grimley Evans, Cho Sung Ho, Jesper Jacobsen, Carlo Minnaja, Javier Alcalde Villacampa, Jorge Rafael Nogueras, Valentin Melnikov) konsideris 16 verkojn de 14 aŭtoroj: 6 eldonitajn en 2020, 3 eldonitajn en 2021, unu eldonitan en 2022, kaj 6 eldonitajn en 2024. La juĝkomisiono decidis atribui la Laŭron de la Akademio al Evgenij Georgiev pro la verko “Ek sor!”, kiu aperis en 2024.

“**Ek sor!**” enhavas sep sonetkronojn, do sume 105 sonetojn, en klasika stilo kun rimiĝantaj kvinjamboj. Al la klasika formo kongruas klasika kaj solena enhavo. La unua sonetkrono, “Terra Incognita”, pritraktas diversajn lokojn, ĉefe montojn, famajn kaj ligitajn kun iu tragedio aŭ mistero.

La dua, “Ek sor!”, rakontas pri nia sunsistemo kun ĉiu soneto dediĉita al unu astro, sed ankaŭ al la dio, laŭ kiu la astro estas nomita. La tria, “Herakliado”, priskribas la naskiĝon, dek du heroaĵojn kaj forpason de Heraklo. La kvara, “La sonĝo”, meditas el la vidpunkto de diversaj profesioj kaj ankaŭ de kelkaj aliaj vivuloj. En la kvina, “Cimbalaro”, temas pri la sortoj de diversaj popoloj ekde antikva tempo. En la sesa, “Murditaj floroj”, ĉiu soneto portas la nomon de iu floro. Kaj la lasta sonetkrono, “Musica Mundana”, temas pri dek kvar muzikiloj el diversaj kulturoj.

Evgenij Georgiev naskiĝis en 1987 kaj loĝas en Karaganda, Kazaĥio. Profesie li estas inĝeniero pri telekomunikado kaj tradukisto el la angla. Li estas esperantisto ekde 2008, kaj liaj poemoj kaj noveloj, kelkaj sub la plumnomo Espopore, aperis interalie en “Beletra Almanako”, “Esperantista Tribuno”, “Heroldo de Esperanto”, “Kontakto”, “Literatura Foiro”, “Monato” kaj “Sennaciulo”. Li estis plurfoje premiita pro siaj poemoj en la Belartaj Konkursoj de UEA.



<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Lingva Konsultejo: Sintezaj kunmetitaj verboformoj

La Akademio de Esperanto en 1999 starigis sektion Lingva Konsultejo (kiu ĝis 2007 nomiĝis komisiono). Ĉiu Esperanto-uzanto povas turni sin al la Lingva Konsultejo kun difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. Demandojn pri vortfarado (novaj nocioj, terminoj) la Lingva Konsultejo povas respondi relative rapide; malfacilaj gramatikaj problemoj kutime postulas pli longan tempon. “La respondoj ne estas decidoj de la Akademio de Esperanto, sed rekomendoj de la Lingva Konsultejo”.

DEMANDO

Mi scivolas, ĉu akademianoj aprobas la jenan uzon:

“Mi legantis ĵurnalon, kiam la telefono sonoris” (anstataŭ “mi estis leganta...”).

RESPONDO

Via demando celas la sintezan kunmetitan verboformon, do “legantis” anstataŭ la kutime analiza kunmetita verboformo “estis leganta”. Rilate tiun demandon ni devas distingi inter la teoria kaj praktika flankoj.

Ni konstatas, ke en la praktiko spertaj parolantoj preskaŭ ĉiam evitas la sintezajn kunmetitajn verboformojn, eĉ pli ol la analizajn. La sintezaj formoj ŝajnas pli tipaj por la lingvouzo de komencintoj, kiuj nature eksperimentas kun la esprimkapablo de la lingvo, dum al spertaj parolantoj ili impresas balaste kaj malpli elegante ol la simplaj verbformoj. Escepto estas la formoj “povintus” kaj “devintus”, kiuj estas oftaj ankaŭ ĉe multaj progresintoj, sed havas specifan signifon (pasintecan kondicionalon – kiu teorie ne devus ekzisti en la lingvo). Alia escepto estas la formo “bezonas”, kiu aperas nemalofte en la pasintaj 25 jaroj. Praktike la sintezaj kunmetitaj verboformoj do ludas ĝis nun nur malgrandan rolon.

Rilate la teorian flankon, regas ankoraŭ neniuj konsentoj pri la principa boneco de tiuj formoj. Ekz. PMEG (<https://mallonge.net/pmeg>) nomas ilin “logikaj”, kaj por tiuj, kiuj uzas la sintezajn formojn, estas evidente, ke ekz. “-antas” ekvivalentas al “estas -anta”. Dume aliaj parolantoj atentigas, ke participoj kondukas ne kiel aliaj adjektivoj, do ne povas principe malkonfirmi, ke ekz. “-antas” ne ekvivalentas “estas -anto”. Estas konstateble, ke mankas ĝis nun profundaj studoj de la problemoj.

Por resumi, la Lingva Konsultejo ne rekomendas uzi sintezajn kunmetitajn verboformojn en ordinara parolo. Se oni volas ilin uzi por eviti la pli longajn analizajn formojn, oni atentu, ke ankaŭ tiujn nur tre malofte oni vere bezonas: Ekz. en la frazo, kiun vi donas kiel ekzemplon, oni ne bezonas la partupon, ĉar simpla “legis” estas sufiĉe klara kaj pli eleganta kaj simpla.

La 12an de septembro 2025.

Kirilo Brosch – Cyril Robert Brosch

Direktoro de la Lingva Konsultejo de la Akademio de Esperanto



Ĉi-somere aperis verko pri la historio de la Esperanto-movado en Centra Azio. Ĉi tiun grandiozan (dukilograman!) studegon verkis du fratoj: Anatolij Ionesov (maldekstre) kaj Vladimir Ionesov (dekstre).

Vidu la du fratojn sur la foto de la media grupo SIUT.

Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2026

3. Antaŭ 80 jaroj mortis **Jean Borel** (1868-1901-1946), svisa ĵurnalisto, eldonisto, volapukisto kaj esperantisto, dum pli ol 40 jaroj loĝinta en Berlino; kunfondinto (1902) kaj vicprezidanto (1902-03) de Svisa Esperanto-Societo, de la eldonejo Esperanto-Verlag Möller & Borel (1903; de 1912 Ader & Borel, de 1923 Ellersiek & Borel) kaj de la gazeto "Esperantistische Mitteilungen" (1904; de 1905 "Germana Esperantisto") kiun li redaktis dum 1904-10; defonda membro de la Lingva Komitato (1905-14); aŭtoro de popularaj lerniloj, tradukinto de "Mateo Falcone. Kaj aliaj rakontoj" de P. Mérimée (1926), kiu aperis inter 30 libroj en la serio "Esperanta Biblioteko Internacia" fondita de li en 1909.

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 41-42.

6. Antaŭ 110 jaroj mortis **Harold Bolingbroke Mudie** (1880-1902-1916), angla borsisto kaj esperantisto, fondinto kaj redaktoro de "The Esperantist" (1903-05), vicprezidanto (1908-12) kaj prezidanto (1912-16) de BEA, unu el la tri ĉeforganizantoj de la 3a UK (Kembriĝo, 1907), kunfondinto de UEA (1908) kaj ĝia unua prezidanto ĝis sia morto.

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 207-209.

13. Antaŭ 135 jaroj naskiĝis **Gyula "Julio" Baghy** (1891-1911-1967), hungara aktoro, reĝisoro, oficisto kaj esperantisto: instruisto, verkisto, aktoro kaj movadano; kunprezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo (1947-50), prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro (1955-60), prezidanto de Hungara Esperanto-Asocio (1960-65); membro de la Lingva Komitato (1924-48), membro (1929-67) kaj vicprezidanto (1938-51) de la Akademio de Esperanto; kunredaktoro de "Literatura Mondo"; aŭtoro de "Preter la vivo" (1923), "Viktimoj" (1925), "Pilgrimo" (1926), "Dancu, marionetoj!" (1927), "Migranta plumo" (1929), "Hura!" (1930), "Printempo en la aŭtuno" (1931), "La vagabondo kantas" (1933), "Sur sanga tero" (1933), "Verdaj Donkiĥotoj" (1933), "La teatra korbo" (1934), "La verda koro" (1937), "Sonĝe sub pomarbo" (1958), "Koloroj" (1960), "Ĉielarko" (1966) k. a.; honora membro de IEL-UEA (1937).

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 19-20.

14. Antaŭ 125 jaroj naskiĝis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (Рублёв, 1901-1919-1979), rusa sovetunia inĝeniero pri kemio kaj esperantisto, membro de la Lingva

Komitato (1929-38), aŭtoro de kelkaj Esperanto-lerniloj, tradukinto de pluraj rusaj literaturaĵoj, inkluzive de la libroforme eldonitaj poeziaĵoj de I. Krilov (1979) kaj A. Puŝkin (2002).

16. Antaŭ 40 jaroj mortis **Hu Yuzhi** (1896-1913-1986), ĉina redaktoro, eldonisto, tradukisto kaj kulturaganto (direktoro de instituto pri eksterlandaj aferoj, direktoro de la ŝtata informa kaj eldona administracio, vicministro pri kulturo, vicprezidanto de la komitato pri reformado de la ĉina skribo, deputito kaj vicprezidanto de la Konstanta komitato (la supera organo) de la Ĉina Popola Kongreso (la ĉina parlamento), prezidanto de CK de la Ĉina Demokratia Ligo k. a.), kaj esperantisto konata en Esperanto kiel Hujucz; kunfondinto de Ŝanhaja Esperanto-Asocio (1919) kaj de ties revuo, disvastiganto de Esperanto (precipe en gazetoj kiujn li redaktis), iniciatinto de la restarigo de la Esperanto-movado en Popola Ĉinio, kunfondinto kaj la unua prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo (1951-86), membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1984); en 1991 aperis la ĉinlingva kolekto “Verkoj de Hujucz pri Esperanto”.

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro”, p. 130-132.

30. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Leopoldo Henrique Knoedt** (1921-1955-2000), brazila industriisto kaj esperantisto; Esperanto-instruisto, membro de la Akademio de Esperanto (1986-95); tradukinto de pluraj verkoj en Esperanton, i.a.: “Elektitaj Poemoj” de Castro Alves (1959), “La Luzidoj” de Camões (1980), “La Balado de Prizono Reding” de O. Wilde (1993), “Vivoj Sekaj” de G. Ramos (1997), “A Raça Menina” (portugaligo de “La Infana Raso” de W. Auld, 1992) k. a.; honora membro de UEA (1992).

31. Antaŭ 135 jaroj naskiĝis **Nikolaj Ivanoviĉ Ĥoĥlov** (Хохлов, 1891-1905-1953), rusa sovetunia ekonomikisto kaj esperantisto, konata en Esperanto ankaŭ kiel Nikolao Hohlov; sekretario de la lingva komisiono de SEU, gvidanto de la Esperanto-sekcio de la sovetunia amikeca societo VOKS, membro de la Lingva Komitato (1929-38); aŭtoro de la populara poemaro “La tajdo” (1928), tradukinto de pluraj beletraĵoj, politikaj kaj fakaj verkoj.

- Legu pli en la enciklopedio “Nia Diligenta Kolegaro”, p. 133-134 kaj en la artikolo “Ĥoĥlov: Muzikon antaŭ ĉio” de Aleksander Korĵenkov <https://sezonoj.ru/2021/02/hohlov-2/>.

Historia ĉefverko de la kuranta jaro

Ионесов, Анатолий; Ионесов, Владимир. История эсперанто-движения в Центральной Азии. Культура по имени Эсперанто. – Ташкент: Издательство «Фан» Академии наук Республики Узбекистан, 2025. – 776 с.



La recenzata verko pritraktas la historion de la Esperanto-movado en Centra Azio. La aŭtoroj evitis eraron, kiam oni esploras la veteron en konkreta urbo, sed ne konsideras tiurilate apudajn regionojn. Rezulte ni havas riĉegan prezenton de ligitaj kun Esperanto historiaj faktoj kaj eventoj okazintaj en Centra Azio dum la pasintaj 135 jaroj.

La prefaca parto liveras al legantoj koncizan prezenton pri la enhavo de la volumo. Ni vidas rezultojn de la profunda esplorado de la Esperanto-historio en Centra Azio, ties ĝermado, evoluo kaj disfloro. La aŭtoroj instigas la legantojn konsideri kulturon de Esperanto, ĝiajn soci-komunikajn praktikojn, projektojn, eventojn, mondkonceptojn, kiuj estas prezentitaj en la historia retrospektivo kaj en kunteksto de moderna kulturologia scio. La aŭtoroj esploris grandan amplekson de arkivaj fontoj, precipe enlan-

dajn (rusimperiajn, sovetiajn kaj postsovetiajn) kaj eksterlandajn periodaĵojn, ekde la unuaj “Adresaroj” (de la personoj, kiuj ellernis la lingvon Esperanto), ankaŭ materialon el siaj privataj arkivoj: leteroj, dokumentoj, fotoj, diversaj publikaĵoj, inkluzive gazetajn eltranĉaĵojn ktp.

La verko konsistas el kelkaj partoj, ĉiu prezentanta la historian enhavon kaj kronikan superrigardon pri konkreta periodo en la evoluo de la Esperanto-movado en Centra Azio. La eldonaĵo enhavas abundajn temajn informojn: fontindikojn pri baza literaturo, bibliografion pri transkultura komunikado, interlingvistiko kaj esperantologio; liston de literaturo pri la Esperanto-movado kaj packreaĵ projektoj; kronologiajn tabelojn de eventoj en la historio de la Esperanto-movado en Uzbekio kaj najbaraj landoj, objekt-noman indeksojn, fotokronikon; simbolajn kaj memorigajn objektojn de Esperanto-kulturo; la rezoluciojn de la Ĝeneralaj Konferencoj de Unesko pri Esperanto; resumojn en Esperanto, uzbeka, angla kaj rusa lingvoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Kompletiĝis la projekto “Rusa Novelaro 2”. Dum kvar jaroj en “La Ondo” ĉiusezone aperis noveloj de elstaraj rusaj prozistoj. La 16-aŭtoran ciklon fermas kvar noveloj de la siberia verkisto Valentin Rasputin (1937-2015). Malkiel kutime, ni ne aperigas lian biografion, ĉar ĝi aperis en “La Ondo de Esperanto”, 2021, №3 (309), kiel enkonduko al fragmento de lia romano “Adiaŭo al Matjora” kadre de la projekto “Dek rusaj romanoj”.

Foto: Valentin Rasputin ĉe kampanilo apud la Siberia rivero Indigirka, norde de la Arkta Cirklo (1985).

Rusa Novelaro. Volumo 2

Fine, ni faris tion. Kio estas Runo-2? Kvar jaroj da laboro. 16 aŭtoroj. 77 tekstoj. Kvin tradukistoj. 550 paĝoj. Vidu la suban enhavtabelon kaj taksu la rezulton.

1. Ivan Bunin. En bieneto. Facila spirado. Sunfrapo. En Parizo. "Madrido" (Tr. A. Korĵenkov). LODE, 2022, №1.

2. Aleksandr Kuprin. Siringo. Viando. Helenjo. Nokta violo (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). LODE, 2022, №2.

3. Maksim Gorĵkij. Foje en aŭtuno. La naskiĝo de homo. Helgriza kaj lazura. La gvidisto (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). LODE, 2022, №3.

4. Fjodor Sologub. La belo. Transformiĝoj. La reĝino de kisoj. Traserĉo. La vojo al Emaus. La fianĉino de Judaso (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). LODE, 2022, №4.

5. Leonid Andrejev. La anĝeleto. Silento. La abismo. El rakonto, kiu neniam estos finita (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. Vyĉegĵanin). LODE, 2023, №1.

6. Ivan Ŝmeljov. La febro. La oveto. La mirakla bileto. La eterna lumo. La agrabla promeno (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. Vyĉegĵanin). LODE, 2023, №2.

7. Aleksej N. Tolstoj. La morto de la familio Nalymov. La inkmakulo. Nataŝa. Manjo. La kunloĝanto (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. Vyĉegĵanin). LODE, 2023, №3.

8. Vladimir Nabokov. La vorto. Kristnasko. Fabelo. Razilo. Teruro. Nubo, lago, turo (Tr. A. Korĵenkov, L. Novikova, V. Vyĉegĵanin). LODE, 2023, №4.

9. Aleksandr Grin. La pilorio. Nokte kaj tage. La parolema koboldo. La edziĝo de Aŭgusto Esborn. La akvarelo. La komandanto de l' haveno (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). LODE, 2024, №1.

10. Miĥail Bulgakov. La ruĝa krono. La ĥana fajro. La blizardo. Estis majo (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. Vyĉegĵanin). LODE, 2024, №2.

11. Vsevolod Ivanov. La kornaĵo. La bebo. La kampo. La vivo de Smokotinin. Andreo Kuzmiĉ (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. S. Neminem). LODE, 2024, №3.

12. Valentin Katajev. La fusilo. Dimanĉe. La rufaj krucetoj. La aĵoj. La surprizaĵo. Patronia (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. S. Neminem). LODE, 2024, №4.

13. Andrej Platonov. La ekdubinta Makaro. La tria filo. La bovino (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). LODE, 2025, №1.

14. Konstantin Paustovskij. Flava lumo. Adiaŭo al somero. Neĝo. La telegramo. Korbo kun abiaj konusoj (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova, V. S. Neminem). LODE, 2025, №2.

15. Vasilij Ŝukŝin. Lupoj. Alfluginto. Li ankaŭ tiun konfuzis. Simbolo de kredo. Saluton al Beja! (Tradukis V. Jurganov, A. Korĵenkov, N. Lozgaĉev, L. Novikova). LODE, 2025, №3.

16. Valentin Rasputin. La renkontiĝo. Rudolfo. La onidiro. Onklino Ulita (Tradukis V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). LODE, 2025, №4.

Dankon pro via kvarjara legado!

Valentin Rasputin

LA RENKONTIĜO

– Jen kiel, – Anna ripetadis. – Jen kiel, ni renkontiĝis! Ne eblis eĉ elpensi! Nikolao, ridetante, levis la ŝultrojn.

Antaŭ tio ili longe esplorigardis unu la alian, poste Nikolao, ne elteninte, aliris kaj demandis: “Ĉu vi estas Anna?” – “Jes, Anna, – ŝi respondis, – sed kial vi konas min?” – “Kaj mi estas Nikolao, se vi memoras min, ja pasis tiom da jaroj”. – “Ho, – ŝi rekonsciigis, kaj mi jam rekonis, post via demando mi tuj rekonis vin, vi ankoraŭ ne sukcesis respondi, sed mi jam rekonis”. Ŝi etendis sian manon al li. “Jen kiel, – ŝi diris mire, – jen kiel, ni renkontiĝis, kio ja okazas en la mondo! Kiu povus imagi!”

Eksonis sonoro, vokante la homojn en la halon, sed tio estis nur la unua sonoro, kaj ili, ŝajne, ne aŭdis ĝin.

“Ĉu vi plu loĝas en la sama loko?” – li demandis. “En la sama, – ŝi respondis, – mi nenien translokiĝis, kaj nun estas malfrue translokiĝi. Kaj kie vi?” – “Kaj mi jen tie – kiam mi revenis post la milito, mi direktis min tien, jam pli ol dudek jaroj pasis”. – “Kaj mi ne sciis, – ŝi diris, – ni loĝas en la sama regiono, sed mi ja ne sciis”.

La sonoro eksonis duan fojon, kaj ŝi, ridetante, retrorigardis al la halo. Jam necesis iri. Post la paŭzo liberaj lokoj en la halo pliigis, kaj ili eksidis en la lasta vico, kie eblis interparoli. Tuj denove komenciĝis paroladoj – tio estis regiona konferenco de la avangardaj agrikulturistoj, al kiu li venis el unu rando de la regiono, kaj ŝi – el la alia, kaj sen ĝi, sen tiu konferenco, ilia renkontiĝo estus apenaŭ ebla.

Ili komencis aŭskulti la parolanton, sed estis neinterese aŭskulti lin, kaj ili simple rigardis, kiel li parolas. Poste Nikolao ne eltenis kaj rigardis deflanke al Anna, al ŝia vizaĝo, kaj ŝi, sentante, ke li rigardas al ŝi, turnis sin al li kaj ridetis per streĉita rideto, preskaŭ duonrideto, preta ĉiumomente malaperi de sur la vizaĝo.

– Li murmuris, murmuris, sed kion li murmuris, ne estas klare, – li diris nur por diri ion ajn.

– Jes, – ŝi konsentis. – Kial do oni ne trovis iun kun pli forta voĉo. Jen se nia estro ekparolas, ĉu vi volas aŭ ne volas, sed vi aŭskultos – kvazaŭ tondro sonas.

Klininte la kapojn, ili ambaŭ malstreĉe ekridis.

– Ĉu ĉe vi ĝis nun estas kolĥozo? – li demandis.

– Kolĥozo. Antaŭ ĉirkaŭ tri jaroj oni diris, ke oni transformos ĝin je sovĥozo, sed poste oni evidente ŝanĝis la decidon – nun silentas.

– Kaj kie ci laboras? – Li komencis ciumi¹.

– Mi estas melkistino. Delonge, jam preskaŭ dek kvin jarojn.

En la halo iĝis brue, kaj la parolanto preskaŭ ne estis aŭdebla. La gvidanto de la prezidantar-tablo faris grimacon, prenis sonorileton kaj eksonoris. La halo ek-silentis kaj rigardis al la gvidanto, al tio, kiel li metas la sonorileton sur la tablon, kiel li, sentante centojn da okuloj sur si, diras al sia najbaro ion, ion nebezonatan kaj hazardan.

– Ĉu vi loĝas en la hotelo? – Nikolao demandis.

– Ne, – Anna flustris, rerigardante al la prezidantaro. – Mia onklino loĝas ĉi tie, mi ĉe ŝi restas.

Li ekridis.

– Sed vi ne timu.

– Oni riproĉas, – Anna konfuzite diris. – Kaj kie vi loĝas, ĉu en hotelo?

– Tie.

Ili iom silentis, kaŝe rigardante unu la alian, poste Nikolao kliniĝis al ŝi kaj proponis:

– Ni jen kiel faru. Baldaŭ ĉio finiĝos, ni iru al mi.

– Sed por kio? – Ŝi singarde demandis.

– Ni interparolu – kial “por kio”? Ni dum tiom da jaroj ne intervidiĝis! Ni sidos, interparolos, por ke neniu malhelpu.

– Mi ne scias.

– Sed kion necesas scii?

– Mi ne scias, kion fari.

– Jen vi iĝis ia sovaĝa! – li miris. – Kiel knabino. Mi memoras, ke en la junaĝo vi ŝajne ne estis timema.

– Ne incitu min, – ŝi diris. – Mi veturos, estu tiel. Vi ja ne formanĝos min.

– Certe, mi ne formanĝos.

Dum paŭzo ili vestis sin kaj eliris. Surstrate jam komenciĝis frua vintra krepusko, sed estis relative varme, kaj tiu ĉi varmiĝo, veninta dum tiuj kelkaj horoj, kiam ili sidis en la konferenco, ŝajnis mirinda. Ne estis kredeble, ke estas decembro, fino de decembro, mezo de la vintro. La homoj paŝis tien kaj reen egale malrapideme, ripozante post la frostoj kaj konstanta vintra hasto. En malhela lumo de la lumiloj, ŝaltiĝantaj en la krepusko, ŝvebis malmultaj hirtaj neĝeroj, restintaj post la antaŭnelonga neĝado, sed ne estis videble, ĉu ili atingis la teron. La aŭtoj veturis preskaŭ senbrue, kaj pro tio ŝajnis, ke ili veturas malrapide kaj singarde.

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kristnaska rakonto

de Paulo S. Viana



Sonja de pluraj jaroj laboras kiel servistino en la hejmo de s-ro Rodolfo. Li estas serioza, silentema okdekjarulo, tute sola en la mondo. Dum jardekoj li laboris kiel mezgrada instruisto. Lia edzino mortis antaŭ kelka tempo, kaj li ne havis aliajn familianojn. La domo estis negranda. Sonja ricevis decan salajron por konservi ĝin pura kaj prepari simplan manĝon. Plej grandan parton de la tagoj s-ro Rodolfo pasigadis spektante la televidon aŭ dormetante.

La eta Berta akompanis sian patrinon Sonja al la laboro en la malĝoja maljunula hejmo. Dum la matenoj ŝi helpetis la patrinon, aŭ desegnis per koloraj kraĵoj, aŭ ludis kun sia pupo Luna, kiu akompanis ŝin ĉie, same kiel ŝi mem akompanis sian patrinon. Posttagmezojn ŝi pasigis en lernejo. S-ro Rodolfo tre malofte parolis al Berta. Malgraŭ tio Sonja instruis al la knabino, ke ĉiumatene ŝi iru al la maljunulo, kaj se li ne dormetas, kisu lian manon kaj laŭte diru:

– Bonan matenon, avoĉjo.

Plej ofte la maljuna homo sengeste rigardis la knabinon kaj per delikata movo karesis ŝian blondan kapon per la dekstra mano. Iam kaj iam li faris strangajn demandojn al la knabino:

– Berta, ĉu vi scias, kion la Suno diris al la Luno, hieraŭ?

– ...

– Ke ŝi havu paciencon kun la steloj...

Berta plenkore ridadis pro tiaj strangaĵoj de la maljuna instruisto. Sonja klarigis al ŝi, ke lia kapo iom ŝvebas, ne tute klare funkcias.

Foje s-ro Rodolfo invitis la knabinon promeni en la korto. Malantaŭ la domo tro

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Literatura sekvo de la 83a kongreso de HEF

de Miguel Fernández

Kiel dirite en LODE-324, la 83a Kongreso de HEF (Hispana Esperanto-Federacio) okazis en la Kastilia urbo Sorio. La partopreno en kelkaj el la programeroj estis aperta al la ĝenerala loka publiko. Unu el la plej entuziasme atendataj kaj partoprenitaj estis la Poezia Vesperto, kiu omaĝe planedis ĉirkaŭ la figuro kaj la verkaro de la engaĝiginta Soria poetino María Ángeles Maeso, kies simpatio al Esperanto sekvigis en 2017 la dulingvan (hispanan-Esperantan) publikigon far la madrida progresema eldonejo “Lastura ediciones” de unu el ŝiaj ĉefaj poemaroj, *Vamos, vemos / Ni iras, vidas*, rigardata kiel eldona sukceso. Por mi, tiame okupiĝi pri la ambaŭlingva prologo al tiu poemaro, en la 3a eldono de la libro, kaj pri la esperantigo de la poemoj en ĝi, prezentis grandan honoron. Tiel grandan kiel okupiĝi, kadre de la HEF-Kongreso en Sorio, pri la organizado kaj prezento de la menciita Poezia Vesperto omaĝe al Maeso.

Partoprenis ĝin krom hispanaj poetoj el Esperantujo ankaŭ ne-Esperantaj el Hispanio kaj Portugalio. Inter la hispanaj menciindas triopo da nuntempaj Soriaj lirikistoj, de kies deklamitaj poemoj mi prezentis al vi mian tradukon en LODE-324. Kun la triopo kontaktigis min la direktoro de grava kultura Soria institucio: Fundación Española Antonio Machado [Hispana Fondaĵo Antonio Machado]. Temas pri Jesús Bozal Alfaro, kiu, jam de nia ekrlatiĝo kadre de miaj preparlaboroj pri la omaĝo, montris apartan simpatian al nia afero. Kun elementoj de nia lingvo li konatiĝis kiel lingvisto, licenciito pri franca filologio ĉe la Zaragoza Universitato, licenciito pri moderna literaturo ĉe la Bordoza Universitato III kaj direktoro de la Oficiala Lernejo pri Idiomoj en Sorio.

Sed la inklinon de Bozal Alfaro al nia afero plipotencigis ties humaneca mesaĝo, kiun la novelo *La Estrella Verde* [La Verda Stelo], de lia plej admirata samurbano el Fitero (Navaro), Manuel García Sesma, prezentas plej kor-karese.

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



“Bruladu mia stel’ sen falo...”

de Ludmila Novikova

Nune, kiam de la nova vento
Tuŝis mian sorton la fantom’,
Tutegale restis mi poeto
De eltraba ora vilaĝdom’.
(S. Jesenin)

En la jaro 2025a ni solenis du gravajn datojn: la 130-jariĝon de la naskiĝo de la granda rusa poeto Sergej Jesenin kaj la 100-jariĝon de lia tragika perejo.

Sergej Jesenin estas la plej amata, la plej populara poeto en Rusio. Li travivis tre mallongan vivon – nur tridek jarojn. Lia viva kaj krea vojo pasis en la drameca kaj epokfaranta periodo por Rusio: la Unua mondmilito, la revolucioj, plena detruo de la malnova kaj konstruo de la nova, soveta ŝtatordo. Tiu ĉi cirkonstanco kaŭzis tion, ke dum siaj tridek vivojaroj Jesenin ĉirkaŭprenis ĉion plej gravan kaj kontrastan. Komence li estis talenta junulo, kamparana filo, frue ekverkinta versaĵojn. Iom poste li iĝis metropola bohemia sensacio, en kies poeziaĵoj reliefiĝas jen malnova Rusio, jen trajtoj de la modernaj mistikaj tendencoj. Poste – la revolucia ŝtormo. Jesenin provas trovi sin en la novaj poeziaj direktoj konvene al la perturbita epoko.

Tamen Jesenin ĉiam konservis la ĉefan trajton de sia poezio, kiun li mem difinis kiel amon al la gepatra tero. Ĝuste pro tio plejmulto da rusianoj ŝatas ĝis nun liajn versaĵojn. La mezzusia regiono kun ĝiaj vilaĝoj kaj naturvastaĵoj, kie naskiĝis la poeto, iĝis por li la ĉefa simbolo de la patrolando. La profundan kaj nostalgian amsenton al la “hejma beno” Jesenin portis tra la tuta vivo kaj genie transdonis ĝin en siaj lirikaj versaĵoj kun fajnaj bildoj de virga naturo kaj simpla kutima vivo de la kamparanoj, en kies medio li kreskis. Por Jesenin la naturo estas eterna beleco kaj harmonio, kiu kuracas la homajn animojn. Ĝuste tiel perceptas ĉiu delikatanima homo tiujn ĉi kortuŝajn lirikaĵojn.

“Mia kor’ - en lok’ de l’ juno...”

Sergej Jesenin naskiĝis la 3an de oktobro 1895 en la vilaĝo Konstantinovo de Rjazana gubernio. Li kreskis en simpla kamparana familio, poste, kiam lia patro forveturis por kelkaj jaroj en Moskvon por perlabori monon, lian edukon prenis al si lia avo Fjodor Titov, kiu estis sufiĉe prospera kamparano. En la domo de la avo abundis libroj, kaj Sergio frue komencis legi. Oni notas la unuajn provojn de la knabo versi en la jaroj 1903-04. Post la fino de la distrikta lernejo li en 1909 eklernis en la paroĥa instruista lernejo, kie li jam serioze okupiĝis pri poezio. En liaj unuaj versaĵoj ni vidas kortuŝajn akvarelajn bildojn de tio, kion oni poste nomos “betula Rusio de Jesenin”. Unu el liaj fruaj versaĵoj “Betulo” iĝis krestomatia, ĉiu rusia lerneĵano konas ĝin ekde la unuaj lernojaroj.

Jen betulo blanka
Ĉe la fenestret’
Kovris sin per neĝo,
Kiel per arĝent’.

Staras la betulo,
Dormas en trankvil’,
Fajras la neĝeroj
Per oreca bril’.

Kuŝas neĝ’ bordere
Sur lanuga branĉ’,
Pendas la panikloj,
Kiel blanka franĝ’.

Rondiranta lante
Sorĉistin’ aŭror’
Ree kovras branĉojn
Per arĝent-pulvor’.

La unuaj poeziaĵoj de Jesenin estas inspiritaj de la naskiĝtera naturo, riĉa je stepoj, kampoj, arbaroj kaj akvaroj. Li trovas originalajn metaforojn kaj aliajn vortfigurojn por transdono de tiuj ĉi ĉarmaj bildoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Homoj devas esti kontentaj pri komoj



László Krasznahorkai jam dum kelkaj jaroj estis en la listo de favoratoj por ricevi la Nobel-premion por literaturo. En 2025 la Elekta Komitato faris ion neatenditan – ili fakte prenis kandidaton de tiu listo. Ĉiam novaj surprizoj el Stokholmo.

Krasznahorkai neniam estis en furorlistoj de venditaj libroj. Verŝajne ankaŭ la Nobel-premio ne ŝanĝos tion draste. Li estas por legantoj, kiuj ŝatas kompleksajn verkojn. Ĉi tiu verkisto ankaŭ montras, ke kompleksa verko ne nepre signifas komplikitan verkon.

Post Svjatlana Aleksejjeviĉ (2015) kaj Olga Tokarczuk (2018) estas denove laŭreato el Centra Eŭropo. Ankaŭ Krasznahorkai komentas nuntempan historion, sed en sia propra maniero. En la vortoj de la elekta komitato: “meze de apokalipsa

teruro, [li] reasertas la potencon de arto”.

Satano dancas la tangon

Krasznahorkai naskiĝis en 1954 en la periferia urbo Gyula. En la periferio vivas ankaŭ la personoj de lia unua romano “Sátántangó” (Satana tango) aperinta en 1985. La loĝantoj de fora, mizera vilaĝo kvazaŭ vegetas sen espero pri ajna ŝanĝo, en ekstrema malriĉeco. Eble la alveno de Irimías, kiu iam forlasis la vilaĝon, ŝanĝos iliajn kondiĉojn, sed montriĝas, ke li estas falsa profeto. Li kaj lia helpanto ne gvidas la vilaĝanojn al glora estonteco. Ili agas por la sekreta polico kaj laboras por sia propra profito. Dancante tangon kun Satano, ili revenas al la komenco. La libro estas en du partoj; en la unua parto estas ĉapitroj de unu ĝis ses, kaj en la dua parto ĉapitroj de ses ĝis unu. En la fino estas la samaj cirkonstancoj kiel en la komenco.

Seriozaj ŝatantoj de filmoj sendube konas ĉi tiun verkon kiel filmon. Krasznahorkai verkis la scenaron por sia samlandano Béla Tarr. La rezulto estas unu el la plej longaj filmoj (450 minutoj!).



La kuracistoj forlasis la frenezulejon

En 1989, kiam Hungario malfermis siajn limojn kaj tiel kuniniciatis la disfalon de la “fera kurteno”, aperis la romano “Az ellenállás melankóliája” (La melankolio


de rezisto). Migranta cirko agitas la loĝantojn de iu eta urbo. Ĝia ununura atrakcio estas giganta, morta kaj abomena baleno. Kun la cirko vojaĝas eta princo, kiu ŝatas disfalon. La paroladoj de la princo agacas la loĝantojn kaj ili finfine ribelas. Ili ne scias ekzakte, kontraŭ kio ili ribelas, do ili atakas ion ajn. La malnova ordo kolapsas, kaj finfine establiĝas nova diktaturo. Estanteco kaj estonteco ŝajne estas senesperaj, kaj ne estas klara distingo inter kulpantoj kaj viktimoj.

Krasznahorkai adaptis ankaŭ tiun romanon por la ekrano sub la titolo “Werckmeister harmóniák” (Harmonioj de Werckmeister). Denove reĝisoris Bela Tarr. Tiu filmo daŭras “nur” 145 minutojn.

Orienta Azio

Krasznahorkai vivis unu jaron dum 1987-88 en okcidenta Berlino. Post la reĝimŝanĝo en GDR li vojaĝis abunde, aparte en orienta Azio. En 1992 aperis lia novelaro “Az urgai fogoly” (La malliberulo de Urga). Urga estas la malnova nomo de Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio. Tiu libro estas modernigo de vojaĝromano. Sennoma rakontanto vojaĝas por forgesi sian melankolion, sed finfine li komprenas, ke fuĝado de si mem ne eblas. La melankolio akompanas lin dum liaj vojaĝoj. Elirejo ne troviĝas.

Krasznahorkai profunde okupiĝis pri la estetiko de orienta Azio. Tio montriĝas ekzemple en “Északról hegy, Délről tó, Nyugatról utak, Keletről folyó” (Norde monto, Sude lago, Okcidente Vojoj, Oriente Rivero), kiu temas inter alie pri la plej perfekta ĝardeno.



Ginsberg kaj la perfekta manuskripto

Verkante la libron “Háború és háború” (Milito kaj milito), Krasznahorkai loĝis en la apartamento de Allen Ginsberg. Li agnoskis la valorajn konsilojn, kiujn Ginsberg donis al li. En ĉi tiu libro Korim volas fini sian vivon kaj pro tio vojaĝas al Novjorko, sed antaŭe li planas entajpi en Interreto perfektan manuskripton por la posteuloj.

En la kadro de ĉi tiu artikoleto mi kompreneble povas nur skrapii la surfacon, sed por istoj certe estas interesa detalo, ke la avo de Krasznahorkai unue nomiĝis Korim.

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:


<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Obsedata farango

Johansson, Sten. *Farango: Romano*. – Novjorko: Mondial, 2025. – 305 paĝoj.

Ĉu vi memoras vian unuan enamiĝon? Tiun portempan freneziĝon, kiam ĉiuj hormonoj bolas? Tio okazas al Frederik (karese: Fredde), la protagonisto de “Farango”, la nova libro de Sten Johansson. En la komenco Fredde estas dektrijara.

Mi ankoraŭ kredas memori la senton kvazaŭ de elektra frapo, kiam mi ekvidis ŝin. [...] Por mi ŝia figuro estis preskaŭ magia. La nigra hararo, kiu kadris rondetan vizaĝon kun delikataj kaj iomete fremdaj trajtoj, ŝia svelta figuro ne tre alta, la etaj manoj kaj piedoj, la delikataj postaĵo kaj mamoj, kiuj nur malmulte pufigis ŝiajn diverskolorajn pantalonon kaj T-ĉemizon, la glata sunbrunigita haŭto de ŝiaj brakoj – ĉio ĉi ja estis tre alloga kaj alportis ian nekutiman eksciton.



Fredde poste rememoras sin kiel naivan infanon.

Sume, mi ne estis tre matura dektrijarulo. La ĉeesto de Mika en miaj fantazioj ŝanĝis tion, kvankam ĉefe en mia menso.

Se mi estis nematura kaj sensperta, aliaj knaboj en la klaso pretendis pliajn konojn. Ne nur pri la gravaj aferoj de la vivo ĝenerale, sed eĉ specife pri nia nova samklasanino.

“Ŝi estas putino, same kiel sia patrino”, deklaris Linus.

La patro de Mika estas svedo, la patrino venas de Tajlando. Ŝi tamen havas alian karieron, ol supozas Linus, ŝi vendas nutraĵojn el Azio.

Fredde estas memfidomanka kaj kontentas pri adorado de malproksime kaj iomete de “stalkado”. (La listo de ne-PIV-aj vortoj je la fino de la libro klarigas, ke “stalkado” estas “daŭre gvati aŭ persekuti iun en ĝena maniero”). Sed unu tagon okazas io...

Anstataŭe ekaperis en unu posttagmezo ekster nia lernejo pli aĝa knabo sur mopedo. Mi ne sciis lian aĝon, nek de kie li venas, kial li nek studas nek laboras sed povas sidi tie, rajdante diskurre sur sia veturilo, kun la motoro knaranta kaj fetoro disiĝanta de la ellastubo. Li apenaŭ rigardis Mikan, kiam ŝi rapidis al li kaj sidiĝis same diskurre malantaŭ li kun la brakoj ĉirkaŭ lia

talio, kaj ili forveturis dum laŭta knarado kaj kun fumnubo el rubgasoj post si. Mi estis paralizita. Per unu fojo mi refariĝis senpova kaj senvalora knabeto, infano sensperta, dum ŝi malaperis supren en la nubojn.

Kaj iam Fredde ne plu estas virgulo.

Kaj ŝi ĉiĉeronis mian fingron denove supren al la ĝusta loko, kie mi plu masaĝis, dum ŝi anhelis kaj ĝemetis. Supozeble ŝi tamen ne spertis orgasmon, kaj mi ne kuraĝis demandi pri tio. Tamen mi tute ne dubis ke ŝi ĝuas. Malgraŭ tio ŝi verŝajne endormiĝis la unua, kaj mi nur kelkan tempon post ŝi. Dum momenteto mi konfuzite scivolis, ĉu Mika troviĝas en la apuda ĉambro trans la vando, kaj se jes, kial nenio aŭdiĝas de tie, sed tio estis tre svaga penso, aŭ eble sonĝo.

Por mi tiu kvazaŭ gvidlibra priskribo de seksa umado estas iom teda. Tamen estas interese, ke Fredde ankaŭ en tia momento devas pensi pri tiu Mika. Kaj foje aperas iu Regina en lia rakonto:

Dum jaroj Regina ne ĉesis ripeti ke mi devus konsulti psikoterapiiston por “liberiĝi de mia obsedo”.

Jen kaj jen Sten mencias la sintenon de Regina, sed ŝia identeco nur malkaŝiĝas en la tria parto de la romano. Tiel nia intereso restas tiklita.

La vivovojoj de Fredde kaj Mika kuras en disaj direktoj. Ili scias unu pri la alia, foje ili eĉ renkontas unu la alian. Mika forestas dum la ferioj. Kun sia patrino ŝi flugas al Tajlando por helpi la fratinon kaj avinon. Mika estas en Tajlando, kiam okazas la enorma cunamo de 2004.

Dum siaj restadoj Mika renkontas la farangojn. Tiun nomon oni aplikas en Tajlando por ĉiuj eŭropdevenaj alilandanoj.¹

“Mi memoras ke vi iam parolis pri malbona konduto de usonanoj en Tajlando. Sed mi ne kredas ke ĉiuj estas same fiaj.”

Mika elsnufis.

“Temas ne pri tio. Ili ne kondutas pli fie ol aliaj farangoj.”

“Ol kio?”

“Ol aliaj tiel nomataj blankuloj. Eŭropanoj kaj amerikanoj. Kelkaj estas veraj porkoj; aliaj nur sensciaj”.

1 Sten verkis amplekse pri sia uzo de neologismoj. La broŝuro estas elŝutebla ĉi tie: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/johansson/abrakadabra.pdf>

Poste ŝi rakontas, ke tajlandanoj ankaŭ traktas ŝin kiel farangon. Tiel ŝi estas fremdulo kaj en Svedio kaj en Tajlando.

“Ĉu vi ne komprenis tion? Tie ĉi Seb [la frato de Mika. – WK] kaj mi ĉiam estis azianoj. Sed en Tajlando ni estas farangoj.”

Mi pripensis ŝiajn vortojn. Ili ja estis iasence logikaj, tamen mi ne povis vere enkapigi ilin.

“Aŭskultu”, ŝi daŭrigis kun sia kutima loka akĉento de Kalmar. “Mi naskiĝis tie ĉi, mi kreskis tie ĉi, mi estas svedino. Mia patro estas ĝisosta smolandano kun flartabako sub la supra lipo kaj kelkaj restantaj eksblondaj haroj, nun delonge grizaj, ambaŭflanke de la kalva verto. Tamen ĉi-lande lia filino ĉiam ĝismorte restos la tajlanda putino.”

Estas multe da kolero en la vortoj de Mika. Ŝi volas fariĝi ĵurnalistino kaj ankaŭ verkas romanon, sub la provoka titolo “Blankaj Porkoj”.

Fredde, kiu fariĝas ne tro sukcesa arkitekto, facile povas sekvi la aktivadon de Mika per sociaj retoj. Regina ne komprenas tiun strangan fascinon kaj nomas ĝin obsedo. Ĉu ŝi pravas? La leganto decidu. (Sed je la fino de la libro vi verŝajne ne plu dubas.)

Ne estas sekreto, ke mi ja ŝatas la verkojn de Sten. Ankaŭ en “Farango” li liveras ĉion, kion mi kutime ĝuas: allogan intrigon antaŭ la fono de nuntempa sveda socio. La leganto renkontas disajn aspektojn de Svedio. Ekzemple adulti ne estas tro granda problemo por Fredde, sed eble estas tro ŝoke por iuj legantoj.

Aliflanke Sten sukcesas komprenigi, kial Mika nenie sentas sin hejme. La renkonto kun iom naiva, sed bonkora svedo kaj polemika kaj provokanta duonsvedino estas valora aldono al nia riĉa literaturo.

Wolfgang Kirschstein

Ŝirmejo aŭ groto

Viana, Paulo Sérgio. *La ŝirmejo*. – Novjorko: Mondial, 2024. – 101 paĝoj.

Soleco inter maljunuloj estas grava problemo de nia tempo. Kiel volontulo mi renkontis personojn, kiuj fieras pri sia nedependeco, sed kies menso pro manko de stimuloj iom post iom forvelkas. Ili eble konvinkis sin mem, ke ili fakte ĝuas spekti televidon la tutan tagon – ĝis la koro ĉesas bati. Ja estas fleghejmoj, sed estas pli da geolduloj ol lokoj en tiuj institucioj. Tio estas tutmonda fenomeno, kiel montras la libro “La ŝirmejo” de la brazila esperantoparolanto kaj kuracisto Paulo Sérgio Viana.

Surbaze de sia kuracista laboro en malriĉaj maljunulejoj Paulo Sérgio verkis du sendependajn rakontojn. La unua, “Taglibro el groto”, estas verkita el la perspektivo de viro, kiu precipe interagis kun sia taglibro kaj vortaro.

Paulo Sergio Viana



LA ŠIRMEJO

MONDIAL

Fine okazas ĝojo, en ĉi tiu malgaja loko. Mi vekiĝis frumatene kun la vorto “groto” en mia kapo. Groto, groto. Ĝi sonas malĝoja kaj lameta, kiel ĉi tiu loko. Ĝi kongruas kun “funebra”: funebra groto, du bone parigitaj vortoj. Sed eĉ estante melankoliaj, ili alportis al ĉi tiu ejo la unuan ĝojon post multaj semajnoj.

Li loĝas en tiu “azilo” kun sia jam demenca edzino. Li ne volas nomi ĝin hejmo por maljunuloj, ĉar tio estas por li *hipokrita eŭfemismo*. La filo ŝajne estas tro okupata por zorgi pri siaj gepatroj.

Ni venis el la ĉefurbo, alportitaj de nia filo. Kompatinda filo, li jam ne povas loĝigi nin ĉe si. Li multe laboras, ankaŭ lia edzino, la adoleskantaj idoj ne interesiĝas pri du senutilaj gemaljunuloj,

malĝojaj kaj bezonantaj zorgojn, tiel ke ni fariĝis penigaj ŝarĝoj.

La vivo en la azilo tamen ne estas kontentiga. Amikeco inter la loĝantoj ne estiĝas, sed ja abunde da kvereloj, ekzemple, okaze de la tago de patrinoj:

Poste mi eksciis, ke tiudimanĉa tumulto okazis pro la tago de patrinoj. Allogite de la voĉbruado, mi puŝis mian seĝon kaj kaŝrigardis la ĉambron de virinoj. Du maljunulinoj brave kriaĉadis, per akutasonaj paroloj, apenaŭ kompreneblaj. Ili insultis sin reciproke, jen la afero. Ili insultis fervore kaj vigle, kiel oni ne povus supozi, ke tio estus ebla, antaŭ kelkaj minutoj, ĉar tiuj du estas inter la plej apatiaj maljunulinoj en mondo plena de sentaŭgaj blankharuloj.

La dua parto de la libro estas parte verkita el la perspektivo de virina loĝanto parte estas observoj pri la okazaĵoj en tiu institucio. La virino estas en iom pli bona situacio, ĉar ŝi ricevas *pension de tri minimumaj salajroj*.

La observoj ampleksigas la horizonton kaj montras kiajn vivkondiĉojn oni povas renkonti en Brazilo:

La soci-asistantino ricevis anoniman sciigon, pri maljunulo vivanta en kloaka tubo, tra kiu elverŝiĝas ekskremento, borde de rivero, en periferia kvartalaĉo. Ili ne kredis, sed aliris por kontroli. Estis vere. La viro apenaŭ sukcesis elbuŝigi nekompreneblajn frazojn. Li ne sciis informi, de kiom da tempo li troviĝis tie. Oni ne povis klarigi, kiel li nutris sian malgrasegan korpon.

Kvankam estas fikciaj rakontoj, la libro baziĝas sur la spertoj de Paulo Sérgio. La stilo ne estas akuzanta, sed iom sobre, registranta kaj ĝuste pro tio tre efika.

En novembro 2025 estis internacia konferenco en Brazilo en la federacia ŝtato Belém. Tie partoprenis ankaŭ la Germana kanceliero Merz. Li diris post la konferenco, ke li ĝojis, kiam li povis forlasi tiun por sia gusto tro mizeran lokon. Ne ĉiuj estas tiom privilegiitaj kiel tiu germana politikisto. Legu pri ili en “La ŝirmejo”.

Wolfgang Kirschstein

Nova ĝardeno en nova platformo!



“Vojaĝo” estas bando de kvar muzikistoj el Tuluzo, en sudokcidenta Francio. Gilles Bénard (klavaroj) kaj Jean-Claude Patalano (saksofono), kiuj ludas kune ekde la mezlernejo, kreis kaj baptis “Vojaĝon” en 2015.

La 12an de decembro 2025 “Vojaĝo” kunlaboro kun la kantistino Galiss’ publikigis la albumeton “La nova ĝardeno”, kiu montras ĉiujn influojn de la grupo: triphopo, mondĵazo, ĵazo, kaj pli. Per ĉi tiu albumeto, la grupo konfirmas sian originalecon per tre personaj muzikaj kreaĵoj kaj trafaj kantotekstoj.

“Vojaĝo” estas grupo dediĉita al mediprotektado kaj al la antaŭenigo de amikeco inter popoloj. Tial ĝi uzas Esperanton, la egalecan lingvon, kiu donas al ĝi internacian publikon. En sia nova albumeto “La nova ĝardeno”, konsistanta el kvin trajtoj, “Vojaĝo” aplikas sian karakterizan miksaĵon de triphopo, ĵazo, mondmuziko, kaj eĉ franca popolmuziko, celante krei energian, originalan, optimisman, kaj kompreneman produkton.

La artistpaĝo de la grupo estas ĉi tie:

<https://www.vinilkosmo.com/node/1150>

Malkovru ĉi tiun bitalbumeton elŝuteblan ĉe Vinilkosmo kaj ĉe gravaj elsendfluaĵaj platformoj: <https://www.vinilkosmo.com/product/253>

Ni invitas vin malkovri la kulminon de pli ol jaro da laboro per la lanĉo de la nova muzika platformo de Vinilkosmo: <https://www.vinilkosmo.com/>.

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



*Gajan Kristnaskon!
Bonan jaron 2026!*

Br! Brr!

Vintro estas la sezono, kiam estas tro malvarme por fari tion, kion ni ne faris somere pro varmo.

Telefonvoko antaŭ la novjarfesto:

- Saluton kara! Kiel vi vivas en Siberio ĉe tia malvarmego?
- Saluton! Estas normale, nur 10 gradoj sub nulo.
- Ĉu? En televido oni diris ke jam 40!
- Jes, sed tio estas ekster la domo...

Estas domaĝe, ke la belaj sezonoj somero, aŭtuno kaj printempo venas nur unu fojon dum la jaro, sed la terura sezono vintro venas dufoje - komence de la jaro kaj fine.

- Kiel eŭropano povas imagi vintron en Siberio?
- Nu, imagu ke vi malfermas fridujon por varmiĝi...

Amikoj demandas junulinon, revenintan de Gronlando:

- Ĉu vere tie estas ege malvarme?
- Imagu - mi lavis la manojn sen forigi la gantojn!

Vintre eĉ plej malbona lernejano komprenas leĝojn de fiziko: pro malvarmo la tagoj malgrandiĝas kaj nur post printempa varmiĝo ili kreskos.

Recepto por protekti vian haŭton kontraŭ frosto kaj vento: prenu botelon da tekilo, limean frukton, iom da salo - kaj neniukaze iru surstraten!

Ĉukĉo venas al ŝamano:

- Ĉu la vintro estos malvarma aŭ ne? Ĉu mi preparu brullignon?

Ŝamano dubeme respondas:

- Nu, malvarma tamen.

La ĉukĉo foriras kaj la ŝamano alparolas Dion:

- Ĉu la vintro estos malvarma? Donu la signon!

Dio respondas:

— Certe malvarma. Jen mia signo - vidu, ke ĉukĉo, foririnta el via tendo, iras por brulligno!

Plukis kaj tradukis **Stano Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Knedu ĝin, sinjoro!

Brian eble estas la sola kiu kuraĝis plendi pri la VK-platformo en la komitata listo... Brian frustre masaĝis pri tio en la unua tago. (Amri Wandel, 9 dec 2025, https://groups.io/g/komitato-de-uea/topic/leciono_j_de_la_6_a_vk/116694774)

Ampara adverbo

Ili geedziĝis kaj amabaŭ ekloĝis en Varsovio. (Roman Dobrzyński: Romano pri Romano, Pola Esperanto-Asocio 2025, p. 89)

Sen perdo de vizaĝo

Sperti unu plian kareson, unu plian kunan promenon, unu plian ludon, unu plian likon de vizaĝo... (KuboF Hromoslav, <https://esperanto.masto.host/@elivilongvive-co/115669851913262495>, 6a Virtuala Kongreso de Esperanto, 6 dec 2025)

Longe penu

Wu Guojiang proponis, ke la klubanoj zorge trovu mankojn kaj pene altigu la ĝeneralan Esperanto-nivelon... (Wu Guojiang, 24 nov 2025, <https://groups.io/g/uea-membroj/topic/116448013>)

Opereca heredaĵo

UEA elkore dankas al Roman Dobrzyński... Lia legaco vivas en ĉiuj dokumentarioj, filmraportoj kaj verkaĵoj kiujn li realigis. (Esperanto, 2025, №12, p. 260)

Ekzotaj spertoj

– Kial vi decidis iĝi TEJO-volontulo?
– [...] Antaŭe mi havis tre belan sperton pri volontulado kun ekzotaj bestoj; en tiu kunteksto mi malkovris novajn flankojn de mi mem, kaj mia deziro eliri el mia “ŝelo” ĉiam pli kreskis. Mi volis ripeti tian sperton en alia medio... (<https://tejo.org/ekkonu-novan-volontulon-de-tejo-kjara>; trovis Ibrahim Bryzgaloff)

Io fia en UEA?

Sed nenion signifan rilate al landaj asocioj, kiuj estas fioioj de UEA. (Ian Fantom, 9 okt 2025, <https://groups.io/g/uea-membroj/message/6693>)

Io bona en UEA

Alvoko al partopreno en la 77a okazigo de la Belartaj Bonkursoj de UEA (<https://uea.org/gk/1259a1>)

Plukis **István Ertl**

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekenstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Jana Zigal. Rete: peranto@esperanto.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горещкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Svedio: Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: leif.holmlund@telia.com.

Usono: Esperanto-USA, 91-J Auburn St #1248, Portland ME 04103. Rete: eusa@esperanto-usa.org.

Oni povas pagi la abonon ankaŭ al nia UEA-konto “avko-u” kaj per la internacia pago-sistemo PayPal ĉe <https://paypal.me/GGORETSKIY>.

Ĝi estas demonstra versio de la 147-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>